Numero: 249.
Februaro: 2013. 21-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kapoŝvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# La estonto de ESPERANTO

Esperanto jam multfoje estis entombigita. Oni opiniis pri ĝi, ke ĉi lingvo estas vana kaj senutila. Nur tempoperdo estas ĝia lernado. En la mondo oni povas uzi ĝin nenie.

Ankoraŭ mi longe povus listigi la argumentojn kontraŭ la zamenhofa lingvo. Sed kial? Ĝenerale ĉiu esperantisto scias pri kio mi pensas.

Junaĝe mi kredis, ke ankoraŭ en mia vivo Esperanto disvastiĝos sur la tuta terglobo, kaj ĝi estos la dua gepatra lingvo de ĉiu homo.

Junuloj ofte revadas kaj kredas, ke en la estonto ĉio estos bela kaj rozkolora.

Bedaŭrinde nun jam vidas, ne ĉio rulas tiel, kiel ni geesperantistoj deziras. Antaŭ ni ankoraŭ la vojo estas tro longa Eble eĉ niaj gefiloj ne atingos la lastan celon.

En mia aĝo oni jam devas vidi la mondon reale. Ne tio estas sekvinda, ke ĉio formiĝu normale kaj la problemoj solviĝu. Estas fortoj, kiuj malhelpas la rapidan disvastiĝon de mia amata lingvo.

Ĉu mi vidas tro pesimisme la estonton de Esperanto? – Eble.

Sed ni ekzamenu, kiuj lernas ĝin? Ŝajne en Hungario la situacio estas promesplena. Miloj komencas lerni la zamenhofan lingvon ĉiujare. Sed tiuj gelernantoj malaperas el nia vidkampo post la sukcesa lingvoekzameno.

Ni parolu sincere. Ili elektis Esperanton pro sia diplomo. En Hungario nur tiu persono ricevas diplomon, kiu havas ŝtatan lingvoekzamenon el iu fremda lingvo.


Bone, ke Esperanto estas akceptita kiel elektita lingvo, sed min tio ege malĝojigas, ke niaj gelernantoj tute malaperas, kaj ilin ni ne povas mobiligi por nia movado.

Certe tio estas ankaŭ nia kulpo. Eble ion ni faras malbone. Fakte Esperanto ne helpas en la postenoserĉado eksterlande. Ankoraŭ ĉe neniu firmao estos postulo la scio de la internacia lingvo, sed oni devigas scii la dungitojn la anglan, germanan, francan ktp. lingvojn.

Se Esperanto helpos plenigi la monujon kaj se ĝi havos ankaŭ financajn avantaĝojn, tiam la homoj sur la tuta terglobo amase lernos kaj uzos ĝin.

Bedaŭrinde la estonto tiom nigras, sed tio estas fakto.

**-Redaktanto-**



# Lingvo

-Mi estas lingvo. Ankoraŭ en la fino de 19 – a jarcento kreis min pola okulkuracisto por solvi la lingvajn konfliktojn inter diverslingvaj kaj diverskulturaj homoj.

Ŝajne komence multaj homoj ĝoje akceptis min kaj en mi oni vidis la esperon.

Verdire jam tiam ekaperis miaj kontraŭantoj, kiuj priridis min dirante: artefarita lingvo ne estas kapabla solvi la babelan lingvan ĥaoson.

Mi jam estas pli ol centjara. En homa aĝo ĝi estas tre alta, sed ĉe ni, lingvoj, mi apenaŭ naskiĝis. Tamen dum mia pli ol centjara ekzisto mi pruvis mian vivkapablon. Sur multaj terenoj mi pruvis, ke oni povas komuniki per mi.

En la pasintaj jardekoj per mia helpo la tielnomataj esperantistoj - kiuj estas miaj persistaj adeptoj - partoprenis centojn da renkontiĝojn, kongresojn, konferencojn kaj diversajn Esperanto-aranĝojn. Mi helpis estigi multe da amikeco kaj per mi diverslingvaj homoj povis kompreni unu la alian.

Tamen mi estas malkontenta, ĉar ankoraŭ registaroj, ŝtatoj ne uzas min amase, kiel la dua gepatra lingvo de la homaro.

Anstaŭ mi oni prefere lernas naciajn lingvojn ne indulgante sin, ĉar la ellernado de tiuj ĉi lingvoj bezonas multe da tempo kaj mono. Nur kelkaj el ili estas kapablaj perfekte ellerni la elektitan lingvon.


Por lerni nacian lingvon ne estas facila laboro. Tio bezonas grandan persistecon.

Mi ankoraŭ vivas kaj espereble mi estos uzata ankaŭ post multaj jardekoj. Tamen mi ne estas kontenta, ĉar mi estus pli gaja, se mi jam fariĝintus la dua gepatra lingvo.

Mi ŝatus kredi, ankoraŭ alvenos tempo, kiam oni ekvidos en mi la valoron, kiam patroj kaj patrinoj komencos instrui min al siaj gefiloj. Se mi malfermas miajn okulojn mi vidas la belegan estonton, kiam ĉiu homo sur nia terglobo parolos kaj uzos min por komunikado.

Homo, mi petas vin, ne forĵetu min! Mi estas por vi. Mi volas plifaciligi vian vivon! Kredu kaj lernu min!

**-Ŝaŝa-**



# Se alvenos la tago

Ĉu vi aŭdis pri sinjoro Grandulo? Certe ankoraŭ ne. Nu, se vi deziras, nun mi rakontas pri li.

Sinjoro Grandulo estas mezaĝa, dikaspekta ulo vivanta en sia komforta, familia domo. Antaŭ duonjaro li eksgeedziĝis kaj ekde tio li estas sola. Do, karaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj, se vi deziras perfektan edzon, ek ĉasi lin!

En iu dimanĉa posttagmezo ripozante en la ĝardeno li ekdormiĝis kaj li havis strangan sonĝon.

Li sonĝis, ke li mortis kaj ĉe la pordego de la ĉielo Sankta Petro atendis lin.

-Bonvenon, filo mia! Envenu la ĉielon kaj rakontu al mi, kion vi faris malsupre sur Tero?

En la ĉielo ĉie belegaj anĝeloj salutis lin ridetante.

-Ho kiom bonega loko! – li ĝojegis kaj li eniris la domon de Sankta Petro.

-Sidiĝu! – diris la sanktulo – Kion vi faris en via vivo? Ĉu vi produktis ion, kio estas valora?

-Jes kompreneble – rapidis respondi sinjoro Grandulo – Mi estis direktoro de iu entrepreno kaj mi perlaboris multe da mono…

-Mi demandis ĉu vi faris ion valoran – interrompis Sankta Petro lin. – En la ĉielo la mono estas nur senvalora papero.

-Mi konstruigis belegan domon.

-Rigardu malsupren, ĝuste incendio pereigis vian belegan domon. Jam ĝi estas nur cindro kaj kelke da karbiĝantaj traboj. Vi ne konvinkis min.

-Mi havis grandan, blankan jaĥton sur la oceano. Ĝi estas la plej rapida ŝipo en la mondo. Dum unu semajno oni povas ĉirkaŭveturi per ĝi la terglobon.

-Ha-ha! Ĉi jaĥto subakviĝis antaŭ nelonge kaj ĝi kuŝas profunde en la oceano.


-Kion vi deziras de mi? – ekĝemis sinjoro Grandulo – Ĉu tio ne sufiĉas?

-Ne – diris ironie Sankta Petro. – Reiru al Tero kaj komencu novan vivon, kiel malgranda insekto por ellerni la veran valoron de la vivo!

Tiam li subite vekiĝis kaj li tuj ĉirkaŭrigardis. Ĉio estis en ordo. Lia domo pompis. Oni telefonis al li, ke la blanka jaĥto gaje naĝas sur la oceano. Krome en la banko lia posedaĵo duobliĝis.

Li trankviliĝis, sed en lia menso tiu eta insekto komencis bori kaj bori….. senĉese kaj persiste……

**-Antal Fehérvári-**



# Pri imaga vojaĝo

**-Fantasta rakonto-**
**VI.**

-Ĉu ankaŭ vi ne scias, kial ni estas invititaj al tiu insulo? – mi ekmiris kaj pli bone mi komencis ĉagreni. – Espereble ni ne estos esplorkunikloj sur tiu mistera insulo. Onidire ĝi estas artefarita. Ĉu vere?

-Jes.Pri ĝi ankaŭ mi aŭdis de iu maristo – ŝi diris indiferente.

-Kion signifas artefarita? Ĉu ĝi estas granda avioŝipo?

-Ho ne! Neniu scias, kio ĝi estas. Ĝi ekaperas neatendite el la oceano, sed ĝi povas fariĝi dum momento nevidebla. Sur ĝi estas lagoj, riveroj, vastaj kampoj kaj arbaroj. En ĝiaj urboj estas vigla vivo. Laŭ la maristo sur la insulo estas paco kaj harmonio. Homo ankoraŭ ne vidis tiel komunecon, kiel tie estas. Ĝi povus esti la modeloekzemplezo de la terglobo. Mi konfesas al vi, sinjoro, mi jam ege atendas ekvidi ĝin.

Mi ne sciis, kion respondi al ŝi. Ŝia entuziasmo surprizis min. Ŝajne ŝi ĝuis tiun ĉi vojaĝon al nekonata, stranga insulo.

Sekvis muta silento. Ni nur rigardis mute unu la alian. De ekstero aŭdiĝis la gaja babilado kaj la fajfado de la laborantaj maristoj.



Ni longe sidis en la manĝejo. Ŝi trinkis glacian teon kaj mi por kuraĝigi min petis de la ŝipkelnero glaseton da konjako. Trinkinte ĝin mi ne sentis min plu kuraĝa. Mia tuta korpo tremis kaj mi ne povis trankviliĝi.

Tion rimarkis ankaŭ mia kunulino kaj ekridetis:

-Kial vi timas? Ja ni vojaĝas al belega, nova mondo, kie nin atendos multe da surprizo.

-Ĝuste pro tio mi timegas – mi elbuŝigis nervoze kaj enrigardis siajn brilantajn okulojn.

Mi ne sciis, kion alportos al mi la morgaŭa tago. Ĉu mi ricevos respondon al miaj demandoj? Sur la ŝipo ĉio estis por mi tre mistera kaj neimagebla. Mi esperis, ke la bela junulino helpos solvi al mi ĉi sekreton.

Sed ĉi babilado ne ebligis al mi vidi pli klare, eĉ de horo al horo ĝi fariĝis pli komplika.

Eble morgaŭ.

(daŭrigota)

# Poezio

Poezio

## ORIGINALA POEZIO DE PETRO PALIVODA

### Pordo

Infaneco...
Homoj surstrate
pri io debatas.
Estas pordo farbata
de l' suno
orkolore.
Mi miras:
kiom da jaroj trakuris –
restis la pordo ora.



### Radioricevilo

Mi sentas planedospiron
en raŭko de ricevilo.
Sur ĉiu diapazono
embuskas por mi eventoj.
El nigra kesteto fluas
kaj voĉo sola,
kaj bru' de tribunoj.
Per turno facila de agordilo
mi ŝanĝas planedohumoron.




### Muziko

Solviĝos en muzik' esenco mia,
per ondo kolizias kun etero,
leviĝas super falso, super vero
kaj perdas originon materian.

Foriĝos por eterne homaj limoj,
al mi etendas manojn milionoj.
Fluadas mi – jen bono, jen malbono,
venen', balzam' inspiras la animojn...

...Vizi' degelis, estas mi en ordo,
la samaj kavaj vangoj, sekaj lipoj...
Violonisto arĉas jam ne kordojn,
sed miajn ripojn.



### Dezerto

ni iras daŭre
mortas pro soifo
ne sun karesas
pato ardigita
sur niaj langoj
vortoj sufokiĝas
oazo
ni iris daŭre
mortis pro soifo
miraĝo



# Por infanoj

## La reĝidino kaj la sepkapa drako

Kaj estis kaj ne estis, iam trans la fabeloceano estis maljuna reĝo. Li havis belegan filineton. La knabino estis tia bela, ke en la tuta mondo ne estis simila.

Lia patro estis tre fiera je sia filino.

Kiam la reĝidino plenkreskis kaj alvenis la tempo por edzinigi ŝin, la reĝo anoncis en la lando, ke li serĉas edzon por sia filino.

Venis multaj riĉaj junuloj, kiel edzokanditatoj. Sed neniu plaĉis al la reĝo. Ĉiujn li forsendis dirante:

-Vi ne estas taŭga por mia filineto. Iru hejmen! Mi ne deziras vidi vin.

La fraŭloj malgaje iris hejmen.Neniu sciis,kian edzon volas la reĝo por sia filineto. Vane oni demandadis, kiel aspektu la fianĉo. La reĝo ne perfidis tion.

Jam naŭdek naŭ juna viro provis bonŝancon, kiam en iu tago ekaperis ankaŭ la sepkapa drako kaj petis la manon de la reĝidino.

-Kion vi deziras? – demandis la reĝo.

-Mi volas edzinigi vian admirindan filineton. Se vi ne donas al mi ŝian manon, mi pereigos vian tutan fortikaĵon kun ĉiuj vivuloj ene.



La reĝo tre ektimis. Li ne sciis, kion fari. Kiel liberiĝi de la sepkapa drako?

-Bone, estu via deziro! – li diris – Sed mi havas etan peton.

-Kio ĝi estas? – muĝis la drako.

-Vi estas tro timiga. Mia filineto ektimos de vi, se vi renkontiĝos dum la geedziĝa ceremonio. Vi havas multe da kapoj. Laŭ mi se vi havus pli malmulte, eble vi ekplaĉus al ŝi.

-Kion mi faru? – demandis senkonsile la sepkapa drako.

-Se almenaŭ vi fortranĉus unu kapon. Tiel vi certe estus pli simpatia.

La drako iom cerbumis kaj fine ĝi kaptis sian tranĉilon kaj forigis el la kapoj la sepan. Tiel restis ses.

Por la maljuna reĝo ankaŭ tiel ne plaĉis la drako. Li diris malgaje:

-Ankaŭ tiel vi estas timiga. Ĉu vi povus fortranĉi ankoraŭ kelke da kapoj.

Tio ne plaĉis al la drako, sed post iom da pensado ĝi kalkulis, se tri kapoj estos fortrancitaj ankoraŭ restos tri.

Do senhezite ĝi forigis siajn tri kapojn kaj esperante ĝi demandis:

-Ĉu tiel nun mi jam plaĉos al via filineto? Mi plenumis vian peton. Mi fortranĉis tri kapojn miajn, eble mi jam ne estas timiga.

-Verdire – ekĝemis la maljuna reĝo – tiel vi jam estas pli bela, sed laŭ mi neniu homo havas tri kapojn. Mia belega filineto ne volas vivi kun trikapa monstro. Ŝi revadas pri blonda princo kun blanka ĉevalo. Kara drako, bonvolu fortranĉi ankoraŭ du kapojn kaj restu nur unu, kiel ĉiu homo en mia reĝlando!



-Reĝo, reĝo, vi petas de mi neeblon. Se mi fortranĉos miajn du kapojn, tia afero okazos al mi, kion ankaŭ mi ne scias. Eble mi perdos mian drakan forton kaj mi transformiĝos je io. Neniu scias, je kio mi fariĝos.

La reĝo ekridetis, ĉar sentis, la drako estas en sia manplato. Se ĝi efektive amas lian filineton, tiam ĝi faros tiun ĉi oferton.

Nun la drako cerbumis pli longe, ol antaŭe. El ĝiaj ses okuloj samtempe ekiris la larmogutoj kaj fine ĝi etendis al sia tranĉilo kaj forigis ankaŭ siajn du kapojn. Restis nur unu kaj tiam okazis miraklo. La drako turniĝis trifoje kaj skuiĝis. En la sekva momento el ĝi fariĝis belaspekta reĝido.

Ĉiu miris ekvidante lin. Je la laŭta kriado ankaŭ la reĝidino enkuris en la tronejon kaj preskaŭ ŝtoniĝis ekvidante ĉi belan junulon.

Ŝia patro tuj demandis ŝin:

-Nu filineto mia, ĉu vi deziras edziniĝi al tiu ĉi reĝido? Li ĵus venis por peti vian manon.

La filino de la reĝo ne hezitis longe. Ŝi akceptis la proponon kaj elbuŝigis: jes.

En la fortikaĵo neniu kontraŭis la geedziĝon, eĉ la koreganoj ege ĝojis.

La maljuna reĝo anoncis la daton de la geedza ceremonio kaj la gastoj komencis venadi unu post la alia.

Ankaŭ mi estis invitita kaj mi iris tien.La geedza ceremonio daŭris tri tagojn kaj tri noktojn. Ni dancis tiom multe, ke miaj botoj trouziĝis.

Se vi ne kredas, demandu mian avinon, ĉar ankaŭ ŝi ĉeestis.

-Onklo Adalberto-

# Karnavalaj bildoj

Karnavalaj bildoj











